

PROTOKOLO DE LA KUNSIDO DE I.S.A.E. DUM LA 38a U.K. EN ZAGREB.

La ĉefa kunsido okazis la 28an de julio 1953. Ĉeestis: Olsson (kongresa numero 69), Angstl (78) el Germanujo, Muberg (110) el Svedujo, Allen-Smith (115) kaj Slade (128) el Britujo, Popoviĉ (329) kaj Panczer (1262) el Jugoslavio, kaj Keur (684) el Nederlando. Baldaŭ post la komenco venis Solzbacher (1573) el Usono kaj Sirk (68) el Aŭstrujo.

Ĉar neniu komitatano de ISAE ĉeestis, la kunsidon je 11 h 25 m malfermis B. Popoviĉ, petante ĉeestantojn proponi la diskutotajn demandojn. Tuj montriĝis granda interesiĝo pri fakterminaroj. Popoviĉ informis ke ekzistas fakterminara sekcio de ISAE kaj ke ĉiu interesiĝanto devas turni sin al ĝi por kunlaboro. Keur opinias ke ISAE devas eldoni la nomlistojn kun la fakoj. Post pridiskuto, dum kiu estis ankaŭ propono pri fakaj nomlistoj, la kunsido konkludis proponi al la estraro, eldoni novan nomliston de ĉiuj membroj de ISAE kun pli detala priskribo de la fakinteresiĝo kaj laŭeble la lingvokompreno.

S-ano Keur starigas la demandon pri nia kunhelpo por la konferenco de UNESCO. La diskuto montris ke la plej bona helpo estos se Scienca Revuo povos eldoni dokumenton-resumon pri ĝisnuna uzo de Esperanto en scienco. La kunsido rekomendas al ĉiuj membroj helpi ĉi tion per sendo de informoj al ISAE kaj per libervola pligrandigo de la kotizo por la sekvonta jaro, se tio estos bezonata pro pliamplekso de la koncerna numero de Scienca Revuo.

S-ano H. Sirk proponis ke ISAE petu de UEA la permeson presi en Scienca Revuo la prelegojn de Internacia Somera Universitato. Post la informo ke la ĉi-jaraj prelegoj eble estos presataj kune, la kunsido proponis presigi en tiu okazo la prelegojn de ISU el antaŭaj jaroj, sed ĉiukaze presigi ilin.

Fine s-ano Sirk peras la proponon de s-ano Haferkorn pri kunfando de ISAE kaj UEA. La diskuto montris ke tiukaze ĉio estos pli multekosta kaj ke estas pli bone resti kunlaboranta faka asocio.

Fino de la kunveno je 13 h.

Pro la gravaj netraleigitaj leteroj okazis poste aldona kunsido, la 29an de julio, de 16 h 25 m ĝis 16 h 50 m. Ĉeestis: Sirk, Popoviĉ, Givoje, Levar (164) kaj Košutiĉ (1447) el Jugoslavio.

S-ano Givoje unue senkulpigas sin pro la neeblo partopreni la unuan kunsidon kaj tiam li tralegis la leteron de la redaktoro de Scienca Revuo, s-ano Roelofs, en kiu li pledis por taŭgaj materialoj por la revuo kaj proponas uzi la prelegojn de ISU. La kunsido konstatis ke la afero estas jam pridiskutita dum la ĉefa kunsido.

S-ano Sirk tralegis leteron de s-ano Haferkorn kun la proponoj fari ISAE traktpreta organo de UEA, kunfandi kongresan sekcion „Esperanto en Scienco kaj Tekniko” kun ISAE, nomi anstataŭanton por redaktoro de

Scienca Revuo kaj alimaniere plifortigi la revuon, ktp. Ĉar la demandoj estis parte jam pridiskutitaj, la kunsido konkludis ke estos bone se la kunsidoj de la kongresa sekcio „Esperanto en Scienco kaj Tekniko” kaj de ISAE estos komunaj. La estraro de ISAE devas tion proponi al UEA.

B. Popoviĉ.

DISKUTO PRI TERMINOJ

001.4 = 089.2

de C. A. TEN SELDAM (Nederlando).

Pruntradukoj.

En naciaj lingvoj ofte troviĝas vortoj, kiuj ŝajnas kunmetaĵoj, sed kies signifo nesimple rezultas el la signifoj de la eroj. Kiel ekzemplon mi prenu la germanan vorton *Ausstellung*. Laŭvorte tradukante, oni akiras „elmetado” (*aus* = el, *stellen* = meti; *-ung* = -ado); sed ĝi signifas „ekspozicio”. Evidente ĝi estas simple „pruntraduko” de la latinida *exposition*; sed laŭ mi ĝi tiel iom perfortas la kutiman signifon de siaj eroj, same kiel la latinida vorto mem. En tiu ĉi kazo, cetere, la nederlanda vorto *ten-toon-stelling* = „por-montrata metado” estas multe pli laŭsignifa.

Ŝajnas al mi ke en Esperanto pruntradukoj estas evitendaj, se tia perfortado de la signifoj de la eroj okazas. Se por la nocio „ekspozicio” ni ekuzus la pruntradukon *elmetado*, io tia okazus; kaj ofta uzado de tiaj „derivaĵoj” fine tute perdigus la taŭgecon por aktiva uzado de *el-* kaj multaj aliaj afiksoj (kaj prefiksiĝintaj prepozicioj), same kiel tio okazis rilate la latinidajn kvazaŭ-afiksojn kiaj *kon-*, *pre-*, ktp. Ĝuste tio ja estas unu el la punktoj kiujn ni kritikis en la naturalismaj artlingvoj: la um-eco de la „afiksoj”.

Por trovi taŭgan vorton oni povas: 1) transpreni (rekte aŭ kun eta modifoj) la latinidan vorton aŭ trafan vorton el alia lingvogrupo — en nia ekzemplo *ekspozicio* aŭ eble *ekspoz(ad)o*; 2) el jam ekzistantaj vortoj konstrui taŭgan vorton — en nia ekzemplo oni povus uzi ekz. *montrado*.

Eventuale oni povus (ekz. por eviti homonimojn) 3) uzi la pruntradukon kun la afikso *-um-* (*elmetumo*), tiel indikante ke la signifo de la kunmetaĵo nur ume rilatas al la signifoj de la eroj; sed ĝenerale unu el la aliaj du vojoj ŝajnas al mi preferinda.

Mi kelkfoje vidis la vorton *kunfiguraĵo* kiel esperantigon de *configuration*. Ĝi ŝajnas al mi nur dube bona: ĝi sugestas „ion kion oni aldonas al figuro” aŭ simile. Tie ĉi, 1) *konfiguracio* aŭ *konfiguro* (de mi preferata; la kvazaŭ-afiksoj *kon-* jam sufiĉe klare indikas ke temas pri *kvazaŭ-kunmetaĵo*), aŭ 3) *kunfigurumo* ŝajnas al mi pli bonaj.

La fifama *plejeble* estas ekzemplo de pruntraduko el nelatinida lingvo (almenaŭ se la etimologio *plejeble* < germana *möglichst* estas ĝusta), kaj estas anstataŭinda per *laŭeble*.

Nur se la pruntraduko *ne* perfortas la signifojn de la vortoj, ĝi ŝajnas al mi ne evitenda. Ekzemplo estas *egalvalora* kiel esperantigo de *equivalent*.

Kvankam iu kiu tute ne scias la vorton pli verŝajne uzus *samvalora*, tamen *egaivalora* estas tute taŭga.

Resume mi do opinias, ke pri ĉiu pruntraduko oni esploru, ĉu ĝi taŭge vortigas la deziratan signifon sen perfortado de la signifoj de siaj eroj.

Se ĝi ne taŭgas, oni povas anstataŭigi ĝin per 1) transpreno de la origina (ofte latinida) vorto, aŭ de taŭga vorto el alia lingvogrupo; 2) laŭsignifa traduko per aliaj esperantaj vortoj, aŭ se tute nenio alia taŭgas, 3) uzo de la pruntraduko kun la afikso *-um-*.

Preskaŭ-Homonimoj.

En nia lingvo troviĝas multaj vortoj kiuj diferencas nur laŭ unu litero. Ekz. *ŝarĝi* varojn en ŝarĝ-aŭtomobilon, *ŝargi* pafilon. Tia metodo de diferencigado de vortoj ŝajnas al mi ne tre taŭga: ĉar la diferenco inter la vortoj estas tiom eta, oni emas intermiksadi ilin. Se diferencigo laŭ formo estas vere necesa, plej efika estas uzado de tre diferencaj vortoj, ofte eĉ el diversaj lingvogrupoj. Tiel oni kelkfoje diferencigis nacilingvajn homonimojn; ekzemple angle „you are *right*” = „vi estas *prava*”; „that result is *right*” = „tiu rezulto estas *ĝusta*”; „the *right* hand” = „la *dekstra* mano”; „the *right* to live” = „la *rajto* je vivado”; (laŭvice slavida, du latinidaj kaj ĝermanida vortoj).

Ofte oni povas ankaŭ diferencigi etimologie parencajn radikojn diverssignifajn pere de kvazaŭ-afiksoj (situo - situacio; labor-ejo - laboratorio; instituto - institucio, k.s.).

Sed ofte oni povas sendanĝere forstreki la diferencon kaj do fari verajn homonimojn. Oni povus diri *ŝarĝi* por „ŝarĝi” kaj „ŝargi”, pro tio ke ĝenerale oni mencias aŭ jam scias *kion* oni „ŝarĝas”. Evidente, tamen, oni faru tion nur se la signifoj estas tre similaj; ne estus rekomendinde tiel forigi ekz. la diferencon *stel’/ŝtel’!*

362.13 : 378(001) (494)

SANATORIO UNIVERSITATA INTERNACIA.

Karaj amikoj esperantistaj,

Vi certe jam scias ke mi decidis, kiel ĝenerala direktoro de la Sanatorio Universitata Internacia¹⁾ kaj de ĝia studada vivo, ke konstanta instruado de Esperanto funkciu en la nova institucio kaj ke ĉiuj ĝiaj gastoj kiuj ne povus interkompreniĝi per la kelkaj lingvoj instruotaj, kaj same ankaŭ la saniga kaj cetera oficistaro, estu devigataj lerni kaj uzi Esperanton.

Mi estas feliĉa ke mi povas kontribui al la disvastigado de la genia lingvo de Zamenhof, utiligante ĝin samtempe por pli rapida kaj pli bona komprenado inter la reprezentantoj de ĉiuj nacioj, kiuj venos regajni la sanon en tiu nova hejmo de sanigado, de alta kulturo kaj de kunlaborado internacia.

¹⁾ Solene fondita la 6an de junio 1952.

Se mi povis fari tiun decidon, tio estas dank’ al la instigo de mia admirinda amiko s-ro Henriko Fischer en La Tour de Peilz, (Svislando), membro de la Akademio de Esperanto, kiu krome bonvolas preni en siajn manojn la realigon de la menciita programo kaj jam de nun komencis la formadon de la elementoj ŝarĝotaj per la instruado kaj la aplikado praktika de Esperanto.

La tutpretigado de la Sanatorio Universitata Internacia daŭros ankoraŭ kelkan tempon pro la granda laboro kiun ĝi necesigas, sed mi estas certa ke mi trovos flanke de viaj gruparoj tiun apogon kiun mi bezonas por plenumi mian grandan taskon, la servadon al la Universitato, al la interhoma frateco kaj al la Paco. Mi dankas tutkore al tiuj inter vi, kiuj rapidis certigi min jam de nun, ne nur pri ilia varma simpatio sed ankaŭ pri ilia aktiva kunhelpado. Illa aprobo fortigis mian kuraĝon kaj mian fidon pri mia agado.

Atendante la plezuron de baldaŭa interrilato, mi ripetas, karaj amikoj esperantistaj, la certigon de miaj sinceraj korsentoj.

Doktoro Louis-C. Vauthier

Unua pioniro de universitataj sanatorioj

Fondinto kaj direktoro de la Sanatorio Universitata Svisa

Iniciatinto de la Sanatorio Universitata Internacia.

Leysin, Sanatorio Universitata Svisa, februaro 1953.

019.941

(048.1)

BIBLIOGRAFIO KAJ RECENZOJ.

I. *Seriŝev*, *Kvara Dimensio de Spaco* (manuskripto).

115

La Redaktoro, ricevinte tiun ĉi manuskripton, petis min tralegi ĝin kaj diri pri ĝi mian opinion. La proks. 140-paĝa maŝinskribita libro, kies aŭtoro, rusa pastro, nun loĝas en Aŭstralio, mallonge mencias en sia antaŭparolo la rilatojn inter la pritraktota temo kaj natursciencoj, matematiko, filozofio kaj eĉ religio. Post mallonga ĉapitro pri „spaco kaj tempo” la aŭtoro per la metodo de matematika analogiado pritraktas spacojn de unu, du kaj tri dimensioj. Laŭanalogie daŭrigante li diskutas ankaŭ la kvardimensionian spacon. Kelkfoje li donas interesajn rezonadojn kaj figurojn. Ekz.. kiel oni povas disfaldi kubon en ebenon, akirante fig. 1, tiel oni povas ankaŭ „disfaldi” la 4-dimensian analogiaĵon de kubo, la „tesarakton” aŭ „bikvadraton”, en 3-dimensian spacon, akirante la ok-kub-aĵon de fig. 2. Per multaj rezonadoj




Fig. 1.




Fig. 2.